

La 42-a ILEI konferenco

DUA INFORMILO



1. Konferencjo: Armii Krajowej 4;
2. Za Kolumbami: Armii Krajowej 9a;
3. Krakovak: Armii Krajowej 9;
4. Oleandry: Oleandry 4;
5. Zaczek: Al. 3 Maja 5;
6. Cracovia: Al. F. Focha 1;
7. U Literatów: Kanoniczna 1;
8. Śródmiejski Ośrodek Kultury: Mikołajska 1;
9. Stacidomo.



Wyższa Szkoła Zarządzania
i Bankowości w Krakowie



Ejo por paŭzoj



Klasĉambro



Aŭlo



Konferencjo (aspekto de str. Armii Krajowej)

La 42-a ILEI-konferenco okazos en *la Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo (WSZiB)*, situanta en akademia hotelo centro 5 min. piede de ĉefa hotelo por partoprenantoj de la konferenco kaj 2,5 km de malnova urbo kaj ĉefa placo de la urbocentro.



Kafejo por bankedo



Salono por kultura programo



Loko de la Nokto de Lingvoj

Eblas antaŭmendi plene pension (matenmanĝo /tagmanĝo /vespermanĝo) je la prezo de 15 € tage, kion ni nepre rekomendas, ĉar aliloke la kostoj estos multe pli altaj kaj apude ne troviĝas aliaj kafejoj aŭ restoracioj. Tiuj, kiuj ne mendis estos priservataj nur post foriro de tuta grupo. Se Vi ankoraŭ ne aliĝis kaj ne mendis tranoktojn kaj manĝojn, rapidu tion fari kaj rememorigu tion ankaŭ al Viaj geamikoj, ĉar la 31-a de marto 2009 estas la lasta tago de la unua aliĝperiodo kaj por mendoj atingotaj nin post la 20-a de aprilo 2009 oni devas aldone pagi 10 % por mendataj servoj. Post la 1-a de majo 2009 ni ne plu povos por vi garantii mendon de tranoktejo. Se Vi mendas lokon en amasloĝejo, bonvolu kunporti proprajn viŝtukojn, litotukoj mendeblas kontraŭ 4 Zl surloke.

Komuna vojaĝo per rekta trajno al UK kostas 20 EUR popersone. Ni mendis vagonon de 2a klaso. Survoje estas antaŭvidata surprizo por vojaĝantoj.

PRISKRIBO DE LA PROGRAMO:

La 17an: posttagmeze *alveno*, registriĝo, loĝiĝo; vespere vespermanĝo, Interkona (*manĝo*)vespero kun diverslandaj manĝoj, alportitaj de la konferencanoj. Ni mallonge prezentos nin mem, niajn landojn kaj alportitajn frandaĵojn dum maksimume 1 minuto, *distra programo*.

La 18an: matene Solena *Inaŭguro*, ĉefprelego; posttagmeze ILEI/UEA *ekzamenoj*, ĝenerala konferenca laboro; vespere, *Nacia Vespere* kaj *distra programo*.

La 19an: matene ekskurso *DT1* piede tra Krakovo, ILEI/UEA *ekzamenoj*, ĝenerala konferenca laboro; posttagmeze ĝenerala konferenca laboro; vespere *koncerto de „Kamea“* kaj *distra programo*.

La 20an: matene ILEI/UEA *ekzamenoj*, ĝenerala konferenca laboro; posttagmeze ekskurso DT2 al Wieliczka, ILEI/UEA *ekzamenoj*, ĝenerala konferenca laboro; vespere *Aligatorejo* kaj *distra programo*.

La 21an: matene *TTI* al Zakopane, ĝenerala konferenca laboro; posttagmeze ĝenerala konferenca laboro; vespere *Teatra vespero* kaj *distra programo*.

La 22an: matene *renkontiĝo* de universitataj instruistoj, *komitatkunsido*, ĝenerala konferenca laboro; posttagmeze ekskurso *DT3* al Niepołomice, *renkontiĝo* de universitataj instruistoj, *komitatkunsido*, ĝenerala konferenca laboro; vespere *Bankedo* en ĉarma restoracio en urbocentro kaj *Konferenca Balo*.

La 23an: dum tuta tago ekskurso *TT2* al Wadowice, Kalwaria, Oświęcim, *Scienca Simpozio* laŭ konferenca temo; vespere *Internacia Arta Vespere* al kiu kontribuos, laŭdezire, la partoprenantoj kaj *distra programo*.

La 24an: matene *renkontiĝo* de universitataj instruistoj, *estrarkunsido*, ĝenerala konferenca laboro; posttagmeze ĝenerala *sembleo*, Solena *Fermo*; vespere *La Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj* en kulturdomo en urbocentro, eventuale koncerto de *JoMo* kaj *distra programo*.

La 25an: matene *matenmanĝo*, *forveturo* al UK per rekta trajno (survoje antaŭvidata *surprizo* por ne enui).

Detala programo aperos en retpaĝo de ILEI (www.ilei.info) kaj Konferenca Libro kun resumoj de prelegoj por la Simpozio kaj ĝenerala programo. Ĝi enhavos ankaŭ priskribojn de aliaj programeroj kaj kelkajn utilajn informojn.

ĜENERALE PRI LA PROGRAMO

Solenaĵoj: *Inaŭguro* kaj *Fermo* okazos en la salono *L. Zamenhof*, la plej bona ejo de la konferencejo.

Kunsidoj de **komitato** estas antaŭvidataj la 22-an antaŭ- kaj posttagmeze kaj de la novelektita **estraro** la 24-an antaŭtagmeze (eventuale ankaŭ komuna kunsido kun reprezentantoj de aliaj e-organizoj) en salono *I. Serdaheyi*.

Simpozio okazos en salono *L. Zamenhof*, en la sama konferencejo la 23an dum tuta tago.

Renkontiĝo de universitataj instruistoj okazos la 22an dum tuta tago kaj la 24an antaŭtagmeze en salono *A. Sikorska-Fighiera*.

Seminarioj: 1) *E-literaturo*, gvidata de fama pola poetino *Lidia Ligeza* donos al Vi eblecon spertiĝi en nia lietartura mondo; ĝi okazos ĉiutage, 6 fojojn po 1 horo kaj 10 min.; 2) *Interkultura komunikado* gvidata de profesorino el Bruselo *Kristin Tytgat* helpos ekkoni stereotipojn kaj venki ilin; ĝi okazos 3 fojojn po 1 horo kaj 10 min.; 3) *Poezia metiejo* gvidata de *Lidia Ligeza* kaj *Adam Lomnicki* helpos ne nur pli bone koni sekretojn de tiu ĉi arto, sed ankaŭ kuraĝigos elprovi plumon; ĝi okazos 6 fojojn po 1 horo kaj 10 min.;

4) *Ekkonu konferencan landon*, gvidataj de lokaj *samedanoj* malfermos por Vi multajn interesajn faktojn; ĝi okazos 6 fojoj po 1 horo kaj 10 min.; 5) *La pola eksprese* gvidata de *Magdalena Tatara* helpos al Vi orientiĝi en surloka medio dum la konferenco (kaj UK); ĝi okazos 6 fojoj po 1 horo kaj 10 min. La seminarioj okazos en salono *A. Grabowski*.

Ekzamenoj de **ILEI/UEA**, elementa kaj meza niveloj; testo okazos la 18an posttagmeze, skriba parto — la 19an posttagmeze kaj parola parto la 20an por elementa nivelo antaŭtagmeze, por meza — posttagmeze. Ili okazos en salono *I. Serdaheyi*. Ne perdu eblecon konvinkiĝi kiom bone vi konas la lingvon kaj konsultiĝi kun pli spertaj instruistoj, se Vi havas demandojn aŭ malfacilaĵojn.

Ĝenerala asembleo — renkontiĝo de estraro kaj ĉiuj partoprenantoj por diskuti pri atingoj kaj planoj okazos la 24-an posttagmeze antaŭ Fermo en salono *L. Zamenhof*.

La artaj kaj distraj vesperoj: okazos en unu el niaj loĝlokoj — Olenadry (str. Oleandry 4), salono *K. Bein (Kabe)*.

Interkona (manĝo)vespero okazos en Olenadry, salono *K. Bein (Kabe)*.

Internacia vespero okazos en ĉefa konferencejo, salonoj *O. Bujwid, M. Sygnarski*.

La Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj okazos en urbocentro, en kulturdomo *ŠOK*, (str. Mikolajska 2) salono *I. Lapenna*

Bankedo okazos en tre ĉarma medio restoracio *U Literatów* en urbocentro (str. Kanonicza 1).

Kafopaŭzoj estas unu el ĉefaj eroj de ĉiuj renkontiĝoj por starigi personajn kontaktojn. ILEI provizos per kafo, teo, cukero kaj iom da dolĉaĵoj, tamen Vi ĉiuj estas petataj kontribui al la paŭzoj per pli da dolĉaĵoj, ĉu kunportitaj de Viaj landoj, ĉu surloke aĉetitaj. En la sama salono *L. Belmont* funkcios ankaŭ libroservo, eventuale iu ekspozicio.

Aliaj programeroj: dum la konferenco vi povos ĝui ankaŭ prelegojn proponitajn de niaj samideanoj kaj invititaj gastoj, partopreni ekskursojn, ĝui vesperan kulturan kaj distran programon.

Tagordo: ke Vi povu pli bone orientiĝi en la programo, jen neŝanĝeblaj programeroj — **matenmanĝo** je la **8:00-9:00** **tagmanĝo** je la **13:00-14:00** **vespermanĝo** je la **18:00-19:00**.



Dormĉambro hotela



Dormĉambro studenta



Amasloĝejo

PRAKTIKAJ INFORMOJ

Ĉiuj, kiuj venos antaŭ la konferenco, t. e. la 16an de julio (aŭ pli frue) povos ekloĝi en elektita hotelo (sen *matenmanĝo*), se iu volas resti en la hotelo pli longe — tio aranĝeblas, nur bonvolu informi prezidanton de LKK Malgoŝia Komarnicka margareta.ilei.pollando@gmail.com kaj kasiston Sjoerd Bosga sjoerd@esperanto.se. Vian alven- kaj forir- tagon, horon kaj manieron bonvolu komuniki al prezidanto de LKK Malgoŝia Komarnicka — en flughaveno, fervoja kaj busa stacidomoj ĉiujn alvenatojn atendas LKK-anoj. Por invito bonvolu turni Vin al membro de LKK Magdalena Tatara mtatara@gmail.com. Lokan monon Vi povos preni per Via banko karto de banko aŭtomato jam en flughaveno aŭ en pluraj lokoj en la urbo, vaste konatajn valutojn eblas ŝanĝi en bankoj